

Lingvo *Internacia*



Duonmonata gazeto

por

Esperanto

eliranta la 1-an kaj 15-an de ĉiu monato

~~~~~  
*XI-a Jaro*  
~~~~~

PARIS V^e

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO

33, Rue Lacépède, 33

ONI ABONAS L. I. ĉe:

a) oficejo de la gazeto en **Paris**, — b) S-ro *P. Ahlberg*, Sekretario de Klubo Esperantista, en **Stockholm**, (Svedlando), Döbelnsgatan 50, — c) S-ro *Manuel Benavente*, Sociedad 14, **Murcia**, (Hispanlando), — d) S-ro *K. Ostanieviĉ*, «Kontoro Esperantista», en **S.-Peterburg** (Ruslando) Jaŝĉik 80, — e) Societo «*Espero*» en **S.-Peterburg** (adr. D-ro *A. I. Asnes*, Bolŝaja Podjaĉeskaja, d. 24. kv. 12.), — f) Firmo *Möller & Borel*, Prinzenstrasse 95, **Berlin S.** (Germanlando), — g) Firmo *J. Lindauer'sche Buchhandlung (Schöpping)*, Kaufingerstrasse 29 **München** (Bavarujo). — Oni sendu abonmonon nur al unu el tiuj ĉi sinjoroj resp. firmoj, aŭ al redakcioj de gazetoj aŭ sekretarioj de grupoj esperantistaj.

Jara abono: sen literatura aldono 5 frankoj, kiun sumon oni sendu laŭeble per poŝta mandato. (Por papermonoj ni kalkulas: 5 frankoj = 2 rubloj = 4 germ. markoj = 4 ŝilingoj = 1 dolaro = 2,50 hol. floreno = 4 skand. kronoj = 5 aŭstro-hungaraj kronoj.) — Kun literatura aldono 7,50 fr.

Prezo de ĉiu numero 40 centimoj; numero de la Kongreso 60 centimoj.

Pago por anoncoj: 40 centimoj por linio (kompostita el «petit» pres-literoj); ĉe pli granda anoncado estas donata rabato laŭ reciproka konsento. Malgrandajn nekomercajn anoncojn ni presas por niaj abonantoj po dudek centimoj por linio. Rabato por almenaŭ ses presoj: 10 %

La ŝanĝo de adreso kostas 50 centimojn.

Poŝtmarkoj estas akceptataj nur por $\frac{3}{4}$ de ilia valoro.

VORTAREGO

FRANCO-ESPERANTA

kunlabore redaktata de diverslandaj esperantistoj, sub kontrolo de «*Lingvo Internacia*» kaj de «*L'Espérantiste*»

Prezo: 17 frankoj. — Prospekton senpage.

La tuta verko enhavos proksimume 80 kajerojn da 16 paĝoj! — Unu kajero da 16 p. vendita aparte: 50 centimoj, aŭfranke 55 c.

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO

33, rue Lacépède, PARIS

Lingvo Internacia

Duonmonata organo en Esperanto

Redakcio kaj administracio **PARIS**, 5-e Arr., 33, rue Lacépède, 33

15 julio 1906

Jules Lemaître : En la ligna ĉevalo (esperantigis <i>Stellano</i>)	401
Rakovski : Artisto (tradukis <i>N. Kabanov</i>).	406
Miksajoj : Dua Universala Kongreso de Esperanto. — Konferenco de la Ruĝa Kruco. — Bagateloj	409
P. Champion : Terkultura kalendaro (Julio).	411

Tra la Mondo Esperantista :

Gazetaro esperantista	417
Diversaĵoj	421

Nia aldono literatura (paĝoj 209-224) : **Aventuroj de l'lasta Abencerago**, de CHATEAUBRIAND (Tradukis H. DESHAYS), *daŭrigo*.

EN LA LIGNA ĈEVALO

— Tial ke vi deziras tion, diris Uliso, al reĝo Alcinouso, mi rakontos al vi alian aventuron.

Mi sieĝadis Trojon jam dek jarojn kaj komencis malesperi, ke ni povos iam kapti ĝin, kiam ĉasta Palaso inspiris al ni artifikon. Ni konstruis grandan ĉevalon el ligno kaj ni disvastigis la famon, ke ni oferas tiun ĉevalon al Palaso, por ke ŝi protektu nian reiron hejmen.

Tiu koloso estis verko de la sagaca Epeuso; ĝi mezuris ĉirkaŭ kvindek futojn longe kaj dekdu larĝe, kaj ĝia ventro pendis je dudek kvin futoj super la tero. Grandan malfermitan faŭkon ĝi havis por ke la vinoj enkaŝigontaj en ĝin povu spiradi kaj iom vidi. Kaj, por ke ĝi estu pli bela, Epeuso fabrikis por ĝi dentojn el arĝento kaj okulojn el multekostaj ŝtonoj.

Oportune aranĝita estis ĝia internajo. Estis en ĝi benketoj por sidadi kaj hokoj por tenadi la vestojn kaj armilojn. Klapego estis borita en la ventro de la monstro kaj en la ĉarpentaĵo de ĝiaj ripoj lerte kurbigitaj kaŝiĝis truoj, tra kiuj oni povis rigardi eksteren.

La loto montris min kun Menelaso, Termandro, Stelenuso, Toaso, Akamaso, Piruso, Epeuso kaj Makaono. Ni enkaviĝis tra la klapego en la ventron de la koloso. Ni kunportis volvtukojn, felojn da vino kaj provizaĵon da pano kaj peklaĵo.

Samtempe, la greka militistaro, brulinte la tendaron, suriris la ŝipojn, forlasis la trojan bordon kaj kaŝiĝis post insulon Tenedoson.

Sola, la giganta ĉevalo staris sur la dezerta marbordo, sub la flama suno. Ni silentadis, plenaj de prempensoj, ĉar ni ne sciis, kio okazos kun ni, nek ĉu ni eliros el nia embusko al la venko aŭ al la morto.

La tempo unue ŝajnis longa.

— Se almenaŭ ni povus kubludi! diris Piruso. Sed en tiu ĉi kaverno ne estas sufiĉe da lumo por kalkuli la punktojn.

La varmo fariĝis ekstreme malagrabra.

— Ni trinku, diris Akamaso, ĉar ni havas vinon.

— Vi estas freneza, mi respondis; ni bezonas klaran kapon.

Fine ni ekaŭdis grandan konfuzan bruadon. Tra la ĉarpentaĵaj truoj ni vidis, ke la Trojanoj ĝoje dismultiĝas laŭ la marrando kaj vizitas la loĝejon de la Grekoj. Vidinte la ĉevalon, ili kriadis pro miro. Tirneto, unu el iliaj estroj, konsilis, ke ili ŝovu en sian urbon tiel minindan verkon dediĉitan al Palaso. Sed Kapiso, pli antaŭzorgema, volis ke oni detruu tiun suspektindan monstron. Pastro Laokóono aprobis tiun opinion kaj eĉ al la koloso ĵetis sagon, kiu trapenetris la muron kaj pikis ŝultron de iu el ni.

— Malbeninda pastro! diris mi duonlaŭte.

— Ni estas perditaj! diris Menelaso.

— Kion do faras Sinono? demandis Stelenuso; ĉu li perfidus nin?

Kaj silente ĉiu el ni tiris sian glavon el la glavingo aŭ firmigis sian ponardegon en sia pugno.

Sed en tiu momento trojanaj rajdistoj alkondukis viron ĵus kaptitan el densaĵo. Li estis Sinono, nia kunhelpanto. Li tre bone ludis sian rolon. Li ploradis, trenis sin surgenu, disŝiris sian

vizaĝon per ungoj. Ni aŭdis lin rakontantan, ke li malamas nin; ke ni difinis lin, kiel senkulpigan oferaĵon por ricevi de la dioj trankvilan reiron, sed ke li prosperis forkuri; ke cetere, ĉar Palaso estas kolera kontraŭ ni pro la forrabo de la paladio, ni oferis por ŝin kvietigi, tiun mirindan figuraĵon de giganta ĉevalo. « Karaj Trojanoj, li diris, se vi malrespektos tiun oferaĵon al Palaso, plej grandaj malfeliĉoj trafos vin; sed se la koloso estos enŝovata en vian urbon, la tuta Azio aliĝos al vi kontraŭ Grek-ujo. Tiel parolis la Apolona oraklo. »

La Trojanoj ŝanceliĝis ankoraŭ. Ni rigardis, tra la fenestretoj, la sendecidajn movojn de la amaso, kaj mi pensis: « Neniam tio sukcesos; ĝi estas vere tro klara. » Kaj mi memoris pri Penelopo sidanta apud sia fadenrado kaj pri mia malgranda Telemako, ludante en la korto de mia hejmo, kaj mi pretigis min por morti.

Dume Laokoono senĉese kriadis al la Trojanoj: « Popolo, oni trompas cin! » Kaj, el nia malliberejo, ni superŝutis tiun babilulon per mutaj malbenoj.

Sed jen du serpentoj, venantaj de Tenedoso, rondiĝas siajn volvaĵojn sur la maro kaj antaŭeniras sur la marrandon laŭ sama linio. Ili starigas sangokoloran kreston; ilia postaĵo kurbigas je tordovolvaĵoj kaj en ilia faŭko tremas triobla pikilo. For de ili ĉiuj kuras. Ili rekte iras al Laokoono, ĉirkaŭpremas per duobla ringo liajn krurojn, liajn brakojn, lian bruston, lian kolon, kaj ankoraŭ superas lin per sia siblanta kapo. Li klopodas per siaj manoj, por disigi iliajn ligaĵojn kaj senespere krias al la ĉielo. Sed baldaŭ li mutiĝas... Kaj, trankvilaj, ambaŭ serpentoj, flanko ĉe flanko, reiras la maron.

— Bonege! diras apud mi Makaono. La pastro ne malmeritis ĝin!

— Ni trinku! diris Akamaso.

— Ne ankoraŭ, mi rebatis.

Sed la Trojanoj ne dubas plu. Ili krias, ke Laokoono estas punita, ĉar li ĵetis sagon kontraŭ sankta ĉevalo, kaj ke oni devas ŝovi la koloson en la kastelon, kie estas la diaj figuraĵoj, kaj kvietigi per preĝado la venĝemon de Palaso.

— Prosperite! diras Termandro.

Kaj mi respondas:

— La dioj frenezigas kiujn ili volas pereigi.

La Trojanoj ja preparas sian ruiniĝon kun miriga agemo.

Unuj renversas parton el la urba remparo por fari vojon por la ĉevalo; aliaj ligas ŝnuregojn ĉirkaŭ ĝian kolon; ĉarpentistoj kaj forĝistoj levas, per apogleviloj, la kvar piedojn de la monstro kaj aranĝas eĉ ĉiu piedo akson, kiu traboras moveblan radon el kverka ligno.

Sed tio ne fariĝas sen skuoj. Tial mi diras al miaj kunuloj:

— Ni enpaku miajn armilojn en la tukojn, por eviti ke la fera tintado altiru la atenton.

La homamaso tiras la ŝnuregojn. La maŝino ekmoviĝas kaj rulas. Infanoj kaj virginoj postiras ĝin, dancante kaj kantante.

— Bone iras ĉio, diras Akamaso: ni trinku!

— Por la sano de la Trojaj belulinoj! diras juna Piruso.

Mi permesis, ke oni malfermu unu el la vinsakoj kaj ni transdonis ĝin unu al la alia. Sed Akamaso trinkis el ĝi pli ol miaj ceteraj akompanantoj, ĉar li ekstreme ŝatis la vinon kaj ne kapablis regi sian deziron.

Dume ni veturis al la urbo, iajoje skuataj tiel fortege, ke ni falis unuj kontraŭ la aliaj. Sed ni restariĝis, εμπremante nian ridon. La ĉevalo transiris la ĉirkaŭmuron. La Trojanoj metis ĝin en la kastelo antaŭ la Palasa tempo kaj fine faris al ni la plezuron forlasi nin. Ili disiris en la urbon por honoradi per festoj kaj festenoj la eniron de la ĉevalo ne suspektante ke ili tiel festas sian propran pereon.

La nokto venis. Estis nigre en nia enaera kaverno. Sed ni ĝojis, pensante, ke en tiu sama momento la Grekoj forlasas Tenedoson kaj sur siaj ŝipoj veturas al Trojo.

La izoleco estis absoluta ĉirkaŭ ni. Sed la urbaj bruoj ĉiam atingis nin, kaj ni ankoraŭ ne povis eliri el nia rifuĝejo.

Ni manĝis senvide. Akamaso sendube profitis la senlumcon por trinki pretersaĝe, ĉar subite li ekparolis bruege, poste ekkantis laŭtege drinkokantojn.

Ni ĉiuj timegis, ke ia Trojano apudvaganta aŭdos tiujn laŭtaĵojn kaj kuros sciigi ke oni kantas en la ventro de la ĉevalo. Sed estis neeble silentigi Akamason per konvinko, kaj ne estis facile pro la densa mallumo ĉesigi lin perforte. Nevenkebla demono agitis tiun ebriulon. Gvidata de lia bruo mi provis kapti lin preterire; sed kiam mi kredis, ke mi tenas lin, mi rimarkis, ke mi eraris. Furioza pro niaj riproĉoj kaj minacoj, li eltiris sian glavon kaj blinde disfrapis. Ni tion sciigis ne per niaj okuloj, sed

pro la doloro subite sentita de kelkaj el ni trafitaj de tiuj okazaj batoj. Iuj el la vunditoj ne povis mallaŭtigi siajn kriojn. Kaj la ebriulo daŭrigis kriegi siajn kantojn. Ni interfrapiĝis en la nokto; kaj dum tiu malordigo kaj terurado, miaj manoj tuŝis vizagon aŭ brakojn, malsekiĝis per sango, blinde. Ni estis perditaj; al mi ŝajnis, ke ekstere paŝoj alproksimiĝas...

Sed ia dio inspiris al mi saveman artifikon. Mi paŝis malantaŭen al unu el la ekstremaĵoj de nia malliberejo kaj apogis mian dorson kontraŭ la muro. Mi vokis nome ĉiun akompanion, escepte Akamason. Kiam mi estis certa, ke ĉiuj estas apud mi, kaj ke la ebriulo estas ekster nia grupo, mi rampis sur la planko ĝis mi trovis la krurojn de Akamaso. Tiam li vane baraktis. Miaj manoj rapide leviĝis laŭ lia korpo ĝis lia gorgo, kiun mi plenforte premis. Li unupece falis; liaj piedoj ankoraŭ moviĝis iom, sed ne longe.

Verŝajne ia enirema dio estis kvietigata per la morto de Akamaso, ĉar poste ĉio sukcesis.

Jam nur granda silento estis. La Trojanoj estis dormantaj. Tra la mallarĝaj fenestroj ni rigardas la marrandon: torĉo brilas sur ŝipo. Tio ĉi estas signalo; kia ĝojo! Post levo de la klapego, ni eliras el la ĉevalo per ŝnuro; ni eniras la urbon enprofundiĝintan en la dormado kaj la ebrieco; ni tranĉas la gorgon de la gardostarantoj kaj mafermas la pordojn al la Grekoj.

JULES LEMAITRE

Esperantigis Stellano

ARTISTO

De Rakovski.

La ekzpozicio havis en superfluo la eminentajn verkojn de l'konataj verkistoj kaj pro tio altiradis en siajn salonojn la sen-nombran multon de ravata publiko.

Mi ankaŭ venis tien kune kun Lumradianto, kaj li diris al mi: « Mi konsilas al Vi studadi ne nur artajn verkaĵojn, sed ankaŭ iliajn verkintojn. »

Kaj mi komencis atente enrigardi artistojn kaj sekvi iliajn agojn.

Unu el ili staris antaŭ la verko de sia skulptilo kaj rigardis ĝin per rigardo plena je l'fiereco kaj ravo. — Tiel ankaŭ Dio, kreinte la mondon, restis kontenta je sia kreitaĵo, — ironie murmuris al mi Lumradianto.

Alia memkontente malrapide iradis en salono, kun rideto aŭskultante la laŭdojn malŝparatajn al li.

— Tiu-ĉi estas la reĝo inter siaj korteganoj, al kiuj li malŝpare faris donacojn, — rimarkis Lumradianto.

Tria tien kaj tien-ĉi kuretadis en homamaso, avide kaptante la vortojn de l'aprobado.

— Tiu-ĉi estos la sklavo, postulanta la rekompencan por sia verko, — malestime aldiris mia kondukanto.

Kvara enaŭskultadis la opiniojn de l'publiko kaj ĉe ĉia malbona preparolo grincis dentojn murmurante: « O malsaĝuloj, mi donis al ili ĉion, kiun mi havis plej bonan, kaj ili ne komprenis min. »

— Por esti sinsekvanta, li ne devas plue preni la skulptilon en manojn, — rimarkis Lumradianto. — Sed, ho ve! en sekvonta ekspozicio li senŝange estos prezentata per nova frukto de sia fantazio, ĉar tiuj, kiuj malbenas la amason, pli ofte ol aliaj, pleje ŝatas ĝian opinion.

Kvina fumadis cigaron, malzorge ekrigardante jen la amason, jen sian verkon.

Li videble estis tute indiferenta kiel al laŭdoj, tiel al mal-laŭdoj.

— Tiu-ĉi estas komercaĵisto, — observis Lumradianto, — li vendis profite sian verkon, ricevis la mendon ankoraŭ pli bonan en materiala senco kaj nun estas kontenta je si mem, je homoj kaj je sia verko. Tiajn oni nomas feliĉaj.

Sed sesan skulptiston mi nenie trovadis. Antaŭ lia grupo la publiko amase sin puŝadis fervore disputante. Unuj gloradis lian verkon kiel la genian kreitaĵon, aliaj nomadis ĝin la naskitaĵo de frenezeco.

Lumradianto forkondukis min en apartan ĉambreton, kie sidis la sesa skulptisto per ŝlosilo sin ferminte. Li ŝiradis siajn vestojn, pinĉadis sian barbon, sin ĵetadis kaj apenaŭ ne ploregadis.

Li forkuris for publiko.

— Blinduloj! — li indigniĝadis je siaj adorantoj — ili estas ravataj de la fuŝita neprosperinta laboraĵo. O, nun mi vidas, — ĝemis li, — kiel malfacile estas aldoni la plastikajn formojn al imagaĵoj dorlotitaj en mia animo! Kiam mi ekvidis la homamason antaŭ mia grupo, kvazaŭ kurteno defalis de miaj okuloj, kaj mi komprenis, kiel grandega profundaĵo kuŝas inter tio, kion mi celis krei, kaj tio, kio eliris elsub mia skulptilo. Mia verko ofendas mian rigardon, ĉar, kiam mi fermas okulojn, sub miaj palpebroj impresiĝas io tiel bela kaj perfekta, ke mi rugiĝas pro la konscio de mia senforteco... Kaj ili ripetadas, ke mi superis min mem, ne komprenante, ke ili estas ravataj de la parodio de mia idealo.

— Sed ĉu mi povos fine, iafoje, enkorpigi mian revon, esprimi per skulptilo tion, pri kio mi revas tagojn kaj noktojn?

Kaj li ploregadis, kaj frenezadis kaj sin ĵetadis.

Kaj Lumradianto diris al mi:

— Jen estas vera *artisto*! Ĉar nevane estas dirita: en malsanoj ci naskos infanojn.

MIKSAĴOJ

Dua Universala Kongreso de Esperanto.— Jen la programo de tiu kongreso, kiu malfermiĝos en Genève, la 28-an de aŭgusto:

Mardon, la 28-an de Aŭgusto. — Je la 8 $\frac{1}{2}$ -a vespere, en « Victoria-Hall », solena malferma kunsido.

La 29-an. — *Matene*, en la Universitato, preparaj kunvenoj (komisiitaroj, sekcioj, kc.); *je tagmezo*, en la « Salono de l'reĝoj », oficiala festeno; — *posttagmeze*, en la Universitato, unua ĝenerala kunsido; — *vespere*, en la Teatro, prezentado.

La 30-an. — Ekskurso sur la lago; akcepto, en Vevey, de la aŭtoritatuloj; — festeno.

La 31-an. — *Matene*, en la Universitato, dua ĝenerala kunsido; — *posttagmeze*, akcepto al la kongresanoj, de S-ro H. Thudicum, en la parko de « La Châtelaine »; — vizito al la Muzeo Ariana; — *vespere*, granda balo.

La 1-an de Septembro. — *Matene*, en la Universitato, kunsido de la komisiitaroj; — *posttagmeze*, en la Universitato, tria ĝenerala kunsido; — *vespere*, en Victoria-Hall, solena fermo de l'Kongreso.

Dimanĉon, la 2-an. — Tago disponebla por la kongresanoj laŭ ilia deziro

La 3-an, 4-an kaj 5-an, ekskurso tra Svisujo: Genève, Montreux, Spiez, Interlaken, Mürren, Bern.

Aliĝoj: OFICIALA KONGRESKARTO (verda karto: 10 fr.) Ciu, kiu aĉetos tiun karton, havos rajton ĉeesti je ĉiuj ajn kunvenoj de la kongreso, ricevi ĉiujn dokumentojn necesajn por la labor-kunvenoj, kaj ankaŭ aĉeti 1, 2, 3 aŭ 4 FAMILIAJN KARTOJN (blanka karto: 5 fr.) por anoj de sia familio.

Alvoko: La Komitato petas, ke oni bonvolu mendi, kunsendante la monon, la kartojn kiel eble plej baldaŭ, por ke oni povu kalkuli la nombron de la kongresanoj.

Loĝado: La Kongresanoj, kiuj volas esti certaj pri konvena loĝado, devas de nun lui ĉambron. La Komitato zorgos pri tio

kaj havigos loĝejon al la kongresanoj kiuj sciigos la datojn de sia alveno kaj foriro, kaj sendos al ĝi almenaŭ tri frankojn por ĉiu nokto. Specialajn dezirojn oni penos plenumi. — Tiuj, kiuj pagos 4 fr., havos kompreneble proporcian ĉambron. Tiuj, kiuj pagos 5, 6 fr., aŭ pli, havos proporcian ĉambron en hotelo. — La Grupoj kaj Lernantaroj, kiuj dezirus loĝi en komunaj dormejoj (kompreneble je tre malkara prezo) devas sendi oficialan demandan leteron kun precizaj detaloj al la Loka Komitato, kiu donos al ili ĉiujn necesajn sciigojn.

Manĝado: Por certigi la kongresanojn pri preciza kosto de manĝoj, la Komitato publikigos nomaron de Genevaj restoracioj kiuj promesis doni tagmanĝon (kun trinkaĵo) po 2 frankoj, kaj vespermanĝon (kun trinkaĵo) po 3 frankoj. — Krom tio, la Komitato sciigas ke en Genevo ekzistas grandaj *Popolaj Restoracioj*, kie oni povas havi simplan, sed bonan manĝon por Fr. 0,60.

Teatra vespero, (29 aŭg.) Ĉiuj grupoj aŭ izolaj esperantistoj kiuj intencis ion kanti, deklami aŭ ludi, bonvolu de nun sin enskribi kaj sendi al la Loka Komitato la tekston de la verkoj, kiujn ili intencas prezenti.

Balo (31 aŭg.) La Komitato petas ke multaj kongresanoj alportu *naciajn kostumojn* por tiu balo.

Kongresaj Markoj: Oni de nun povas aĉeti, por glui sur leteroj aŭ poŝtkartoj, la oficialan markon de la Kongreso kun arta ilustraĵo. Prezo: 100 markoj Fr. 1,50; 500 markoj Fr. 5.

Aliĝojn, monon, korespondaĵojn, ktp., unuvorte ĉion, kio koncernas la kongreson, oni sendu nur al:

Kongresa Oficejo

15, quai de l'Île, Genève, Svisujo.

Konferenco de la Ruĝa Kruco. — En Genevo malfermiĝis la 12-an de junio, oficiala konferenco por revizii la « Genevan Interkonsenton », kiu fondis la Ruĝan Krucon.

En ĝi partoprenas 38 regnoj, nome: Argentina Respubliko, Aŭstro-Hungarujo, Belgujo, Brazilujo, Bulgarujo, Ĉilio, Danujo, Francujo, Germanujo, Grand-Britujo, Grekujo, Gvatemalo, Ĥinujo, Hispanujo, Holandujo, Honduraso, Italujo, Japanujo, Kolombio, Kongo, Koreujo, Luksemburgo, Meksikujo, Monte-

negro, Nikaragvo, Norvegujo, Peruo, Persujo, Portugalujo, Rumanujo, Rusujo, Salvadoro, Serbujo, Siamujo, Svedujo, Svisujo, Unuigitaj Ŝtatoj, Urugvajo.

Jen la ĉefaj demandoj submetitaj je la konferenco:

1. — Proktekti kontraŭ malbonfaroj la vunditajn militistojn;
2. — Ebligi la rekonon de la kadavroj, per distingiga signo, donita al la militistoj ;
3. — Faciligi la komunikon de la nomaro de la mortintoj, vunditoj kaj malsaniĝintoj al la aŭtoritatuloj de iliaj landoj;
4. — Devigi al la militantoj la hejmensendadon de la kuracitaj militkaptitoj, kiuj ne povas plu servi en milito;
5. — Doni al la membroj de la helpaj societoj la saman protektadon, kiun ĝuas tiuj de la militista kuracistaro.
6. — Forigi la 5-an artikolon de l'interkonsento, kiun oni neniam povis apliki (tiu artikolo kondiĉas ke ia loĝanto, gastiganta vunditon, estos liberigita de la enloĝigo de soldatoj, kaj de la pago de milita imposto);
7. — Inviti la registarojn, ke ili publikigu la tekston de l'interkonsento, kaj faru la neceson por ke malobedoj, kontraŭ ĝi faritaj de soldataroj kaj privatuloj, estos punataj.

Bagateloj.

KALUMNIO. — *La sinjorino* Kial vi devis forlasi vian lastan mastrinon ?

La dungota servantino : Ĉar ŝi kalumniis min. Ŝi diris, ke mi forŝtelis de ŝi dekduon da arĝentaj kuleroj, kvankam ŝi bone sciis, ke unu el ili jam delonge mankis.

GUSTA RESPONDO. — Esploristo de mortintoj demandas la vidvinon :

— Kiu kuracis vian edzon dum lia malsano ?

— Neniu, — respondas la vidvino, — li mortis sen helpo de kuracisto.

Terkultura kalendaro.

(Daŭrigo)

J U L I O.

Vi kredeble sciigis pri tiu bonega avino, kiu senĉese legis saman romanon, ĉiam novan por ŝi, ĉiam interesan. — Vi suspektas tamen, — kaj mi ankaŭ, tion mi konfesas — ke ŝi legis ĝin iom dormante, almenaŭ ne tre atente. Sed ni povas esti tre malpravaj, kaj la verkinto estis sendube unu el tiuj feliĉuloj — maloftaj — kies ĉarmoj estas iom post iom ŝatataj, kaj pli kaj pli ĝuotaj.

Nu! plej mirinda el ĉiuj libroj vidiĝas nedisputeble tiu dolĉega ĉeflibro, nome la ĉiam ŝanĝiganta naturo, ĉar ĝi memorigas al ni ne nur mortintan aŭ mortontan verkiston, sed eterne vivantan aŭtoron. Cetere kia verko, elirinta el homa mano, povus iam simili tiun, kiun elpensis la Dia potenco? diris Bernardin de S:t Pierre. « Tiel ampleksa estas la lernado pri naturo, tiel larĝan poemon tiu ĉi bonega naturo prezentas al homo, ke ĉiu povos ĝin studi laŭ sia plezuro.

Herbejo sufiĉos, ĉar ĝi estas multefolieta libro; tie botanisto sistemojn ekvidos, kuracisto simplajn herbojn (simplherbaĵojn?) pentristo girlandojn, poeto harmoniojn, militisto batalejojn, amanto ripozejojn, kamparano fojnfaskojn; sed ili ĉiuj devus nur tie vidi bukedojn, lasu ilin kroni per tiuj ornamaĵoj siajn junajn kunulinojn... »

Ciuj lerte, kiaj ajn ili estos, pentristoj aŭ kuracistoj, poetoj aŭ militistoj, amantoj aŭ kamparanoj unuvoĉe konsentos, kaj kune kun ili ĉiu terkulturisto, ke plej aminda estas promesplena *bukedo* de sufiĉega grenrikolto, premio de tutjaraj laboroj, espero de la morgaŭa vivado.

Tiun rekompencon Julio donas. Tamen terkulturisto, de la unuaj tagoj de l'monato, rajtas nur diskonti, aŭ se vi pli amos, antaŭĝui la baldaŭajn, ne ankoraŭ hodiaŭajn promesojn.

Ilin atendente, li ne devas krucigi al si la brakojn. Li provizas ligilojn, li prizorgas la tutan terkulturan materialon, li stariĝas pri la tonditaj landoj, li atentigas la estontan ŝafaron. Tiam tute ĉesas verda nutraĵo, oni paŝtas la kornobestojn en herbejojn, ne difinitajn por postfojno, ne forgesante tamen doni al ili furaĝajn kreskaĵojn, kaj luzernojn duafoje falĉitajn.

Sed jam alvenis intertempe la granda rikolto de ĉiuj grenaĵoj. La preciza tempo por falĉi la grenon estas kiam, ĉar la greno ne jam lakturniĝas, vi sukcesas facile ĝin ektranĉeti per ungo kaj kiam la blankiĝinta pajlo kunhavas ankoraŭ verdajn malsuprajn tuberojn. Nature, preskaŭ ĉie, ĉiujn ilin oni rikoltas hodiaŭ per meĥanikaj rikoltiloj, tiel en malgrandaj kiel en grandaj ekspluatejoj.

Ekvidu tie ĉi kaj tie la multegon da rikoltantoj, tiel ameme, tiel ĝoje laborantajn. Oni jam falĉas hordeojn, sekalojn, vintrajn avenojn, kaj preskaŭ tuj, en la bonaj kaj varmaj teroj, oni rikoltas tritikojn. Tiuj ĉi servistoj tranĉas tritiktrunketojn, kaj tiuj ligas ilin formante garbojn. Ĉiuj rapidas labori, ĉiuj samtempe ŝajnas kanti dankeman himnon. Ĉu ne urĝas la tempo? — Oni ne devas lasi sekiĝi sur tero tritikon, kiu jam estas tro seka, kaj oni portas ĝin en garbejojn, kie ĝi tuj estos grenereto, kiu vivigas la homojn.

Oni ne procedas tamen sammaniere sub la malvarmaj kaj malsekaj klimatoj, zorgante lasi en tiuj lokoj grenaĵojn etenditajn sur tero, aŭ kuŝantaj per maldikaj tavoloj, kiujn oni returnas ĉiutage matene dum kelkaj tagoj, por ke ili estu tute submetitaj al enfluo de la suno kaj de la roso; oni returnas ilin pli ofte kiam la vetero estas samtempe malseka kaj varma. Se pluvos tamen, tio ne sufiĉas plu, kaj por malhelpi ke ŝimu la tritikoj, vi aranĝos ilin garbare, atendente ke ili iĝu tre sekaj. Ĉi tio nature dependas de multaj kaŭzoj, inter kiuj unua estas la loka varmgrado; ĉar en la nordo de Francujo, tritikrikolto nur okazas dum Aŭgusto.

Kvankam tiu rikolta vetero estas tre laciga kaj maltrankviliga, ĝi estas ankaŭ periodo de festoj tiel por mastroj kiel por laborantoj. La unua garbo kaj la lasta estas ofte festitaj per sonoriloj, per manĝadoj aŭ kampaj dancadoj.

El tiaj rikoltaj festoj Emile Souvestre iam belete rakontis la jenan:

« Tuj kiam oni finas la lastan garbejaĵon (airée), la draŝistoj kune antaŭeniras al bienisto, montrante al li, en garbejo, garbon kovritan per floroj kaj rubandoj. Ĉiuj iliaj klopodoj por sublevi ĝin estas senutilaj; tiu garbo pez: s kiel la pezo de la tuta rikolto, kaj postulas esti portata sur la garbejon (aire) nur kiam la farmmastro kondukos ĝin tien, ĉar ĉiu ordonas sian riĉecon kaj sola rajtas disponi ĝin.

La bienisto do iras al la garbejo (grange), kie, helpata de siaj plej proksimaj parencoj, li sublevas la garbon, dum aliaj rikoltkolektistoj organizas sekvantaron. Unue, marŝas la balaistoj kiuj purigas la vojon antaŭ tiu emblemo de la rikolto; post infanoj familia viva prezentado ĝojege ekkrias skuante, en siaj manetoj, tufojn de spikoj. Se fremduloj iaj estas en la buena domo, tiuj ĉi postvenas, portitaj sur branĉeta portilo, kaj akompanitaj de du filinetoj kiuj prezentas al ili stanan pladon, kun nova tritiko kaj floretoj, unuvorte kio estas necesa kaj ĉarma, duobla simbolo de gastemaj devoj.

Pli malantaŭe marŝas la ventolisto, ĵetante en la aeron la grenon kiun li purigas; postvenas draŝistoj, kies draŝiloj takte frapas teron.

Tuj kiam oni ĉirkaŭigis la garbejon per sama ordo, je bruo de ridoj, kantoj kaj pafoj, paŝitaj de la hejmaj filoj, tiam la tuta sekvantaro haltas; oni malligas la garbon, kaj la bienistino alportas, sur seĝo kovrita per blanka tuko, vinon, buteron, tritikpanon; oni trinkas, manĝas kaj daŭrigas laboradi ĝis kiam garbejaĵo (l'airée) estos draŝita kaj relevita.

Samtempe, oni pretigas vespermanĝon en la buena domo. De la antaŭa tago, junaj rikoltistoj zorgis demeti bukedon de herbejaj floroj sur la melkseleto (sellette à traire) de ĉiuj bienaj staloj. Tiun inviton komprenis ĉiuj bienistoj, kiuj alvenas el ĉiuj vojetoj kun fromaĝoj de kazeigita lakto. Fine, kiam la rikolto estas enigita domon, ĉiuj sidiĝas ĉe la tablo, kaj tiufoje sole, pro la egaleco, kiun fondas la ĝojo, la virinoj sin lokas flanken de viroj. Junuloj alportas bukedojn, plej bela filino prezentas intersekve al ĉiu kunmanĝanto plenkuleron da kazeigita lakto, kaj ĉiuj voĉoj hore kantas la rikoltan rondkanton. »

— En la Pariza ĉirkaŭaĵo, la Julia monato estas uzata por falĉi naturajn herbejojn, furaĝajn kreskaĵojn marte aŭ aprile semitajn, kaj unuan luzernan postfojon. Tie ankaŭ, okaze de pluvo, oni profitas tiun tempon por enkonduki akvon en

herbejojn senigitajn je fojno, aŭ por transporti gratigaĵojn akvajn sur la bezonantajn terojn.

Se vi uzas ĉevalojn por la farmlaboraĵoj, vi saĝe faros en tiu monato, dum same premadas laborado kaj varmo, aldonante al ilia porcio kelkajn refreŝigajn manĝaĵojn, kiel verdan luzeranon; aŭ anstataŭigante iafoje parton de aveno per brano kaj surverŝante fojnon per sala akvo. Vi ne forgesos banigi ĉevalojn ĉiutage, vespere aŭ matene laŭkonvene.

Post la formeto de rikoltoj, oni paŝtas brutaron en la pajlejojn; malmultajn zorgojn postulas tiam kortbirdaro; sed ĉiam senĉese tre zorgata devas esti la kamparo. Vi donas trian plugon al senkulturejoj, post kiam ili estas atente erpitaj. Oni senpajligas profunde je dek centimetroj la terojn portintajn oleo-brasikon (colza), tiamaniere ke oni enterigu la semojn de malbonaj herboj. Oni same faras pri la sakaloj kaj fruaj hordeoj, kiuj utilas por la verda nutraĵo al ĉevaloj. Oni ofte erpas, prilaboras, sarkas aŭ ĉirkaŭigas per tero rapojn, brezilajn terpomojn, fazeolojn, napojn, k. t. p.

Rikoltataj estas ankaŭ dum Julio la vintraj faberetoj, kies maturaĵon ekmontras dubenigra nuanco de la trunketoj kaj grenenvolvoj; la vintra furaĝa kreskaĵo (vesce d'hiver) konservota kiel semo; kaj same la kulturita oleopapavo (œillette). Vi povas dum Aŭgusto rikolti tiun ĉi kiu alportas ordinare bonan liveraĵon (rendement), ĉar unu hektaro meze donas de 12 ĝis 15 hektolitroj, kaj unu hektolitro da greno faras 25 aŭ 30 litroj da oleo.

Vi falĉos la furaĝajn kreskaĵojn kaj pizojn ĉiuloke en Francujo, kiel ni ja diris tie ĉi supre pri la Pariza ĉirkaŭaĵo; ili estas la nova nutraĵo difinita por la brutaro; ni aldonu ke maizo estas verde manĝebla.

Plezuriga ĝardeno. Ĉar ĉiuj floraj plantadoj estas plenumitaj, Vi nur konservos purajn korbegojn kaj bedojn. Vi kovros teron per pajlaĵo, konsistanta el tre konsumita sterkaĵo, celante moveblecon kaj freŝon de l'tero; tial vi malpli ofte superverŝos ol en nuda tero, kaj samtempe la kreskaĵoj profitos nutraĵon entenatan en sterkaĵo, kaj pluvoj aŭ surverŝoj solvigos la nutrajn elementojn, kiujn ili fortiras al radikoj.

Iaj kreskaĵoj, kiel Petunioj; iaj kreskaĵoj diversaj, kiel Begonioj Floksoj de Drummond (Phlox), Geranioj, k. t. p. bezonos esti pinĉataj por ke ili ricevu pli multajn branĉetojn

kaj samtempe pli multajn florojn. Oni povas fiksi sur tero per lignaj hoketoj la branĉojn de Verbenoj kaj de Petunioj, kies kapo pli rapide estos kovrita.

Vi purigas Rozujojn, formetante velkitajn florojn, kaj pri ĉi tiu vi bone agos sulfurante ilin, por ilin antaŭgardi kontraŭ la blankaĵo (le blanc), kaj vi daŭrigos la transplanton de burgonetoj sur aliajn trunkojn (écussonnage).

Grandaj kreskaĵoj, kiel Dalioj, Glaioloj (Glaieuls), k. t. p. estos subtenotaj per stangetoj aŭ alligotaj per feraj fadenoj; vi tion faros precipe pri la Glaioloj linie plantitaj.

Vi komencos semadojn de dujaraj kreskaĵoj, nome flavaj Levkojoj, duoblaj aŭ unuoblaj; Violoj, Kampanuloj, Ankolioj (ancolies), Digitaloj, Mufloj, (Mufliers), kaj ĝenerale ĉiuj dujaraj kaj persistaj kreskaĵoj.

Krisantemoj estos reenpotitaj (rempotés) por la lasta fojo, kaj oni ĉesigos pinĉojn de la 10-a ĝis la 15-a. Vi stangetos (tuteurrez) kreskaĵojn, prizorgante insektojn kiujn vi detruos per nikotino; vi sulfuros ilin ĉiusemajne por ilin antaŭgardi kontraŭ la rustaĵo kaj tion vi faros plivole matene, zorgante antaŭjeti sulfuron de malsupre supren por atingi (trafi?) la folian subon (les dessous des feuilles); prizorgu surverŝojn kaj varmetigojn (bassinages), tiuj ĉi precipe post la varmaj tagoj.

En *legoma ĝardeno* vi devas ankaŭ zorge laboradi; antaŭ ĉio repiki la plantujojn elvenantajn el juniaj semadoj, kies produktaĵoj estos rikoltataj dum la malantaŭa sezono; poste sarki kaj pajligi; fine sufiĉege surverŝi. Oni facile komprenas ke ĉio tiom plie kreskos ke oni pli multe surverŝos kaj grasigos ĝin; surverŝado kaj grasigaĵo estas la du precipaj fundamentoj de terkulturo. — Vi semos ankoraŭ laktukojn, skarolojn, romanajn salatojn, cikoriojn, brasikojn, spinacojn, fazeolojn; vi daŭrigos la brasikajn plantadojn.

Vi tondetas la melonojn, pinĉos tomatojn, kaj tiujn ĉi vi prizorgos per la Burdigala Kaĉo (bouillie bordelaise) por forigi malsanigojn. Vi preparos la fragujan plantujon por akcelota kulturo.

La « bouillie » konsistas el 100 litroj da akvo, 1 kilogr. da kupra sulfato, kaj 500 gramoj da grasa kalko (vive pesita). — Se vi ne havas bonan kalkon, vin ĝin anstataŭigas per sola karbonato, kaj vi ricevas la « bouillie bourguignonne » konsist-

antan el 100 kilogramoj kaj 500 gramoj da akvo, 3 kilogr. da kupra sulfato, kaj 4 kilogr. 500 gr. da sola karbonato.

Frukta ĝardeno. — Ekmoviĝas la aŭgusta plantsuko, tial la piramidaj kaj spalieraj arboj bezonas esti pinĉataj iom post iom, ĉiutage kaj parte. Vi daŭrigos pinĉi kaj spalirigi la vinberujojn, kiujn vi prizorgos per sulfuro kaj Burdigala kaĉo, por ilin antaŭgardi kontraŭ Oidium kaj Mildio; vi klarigos kaj tondetos vinberojn.

Vi ne surverŝos persikujojn, sed ilin malsekigos per varmeta akvo, vespere post la subiro de l'suno; vi formetos aŭ klinigos foliojn de la fruaj specoj por ke la suno kolorigu ilin. — Vi pinĉos ankoraŭ, rompos, tondetos tie ĉi kaj tie por faciligi la vastiĝon de la florburgonoj.

Oni jam en tiu monato sufiĉege rikoltas ribojn, frambojn, nigrajn ribojn, kaj baldaŭ aprikotojn, aŭ fruajn persikojn Amsden, figojn — en la lastaj tagoj, prunojn, fruajn pirojn kaj pomojn — kaj en varmejo — nature — tre kolorigitajn kaj sukeritajn vinberojn.

— Sed, kio plezurigas la plej multaj el ni ĉiuj, tio estas agrabla, malrapida, julia promenado en arbaro.

Lasu min ankoraŭ, kara leganto, mi petas, eniri kun André Theuriet en arbaretojn de l'Bassigny-lando.

« Kverko, diras li, estas forto de arbaro, kies betulo ĉarmo estas, abio, lulkanteto, kaj silio, intima poezio. La tuta arbaro enhavas ion (mi ne scias kion) karesan, allogantan; ĝia fleksibla ŝelo, griza kaj balsamumita, sangadas pro plej eta vundo; vintre, ĝiaj maldikaj kreskaĵetoj purpuriĝas kiel vizaĝo de filineto al kies vangoj sangon suprenigas malvarmo; somere, ĝiaj korformaj folioj dolĉe pepadas kiel kareso. Iru ripozi sub ĝian ombron dum bela junia (aŭ julia) posttagmezo, kaj vi estos prenata kiel per ĉarmo. La tuta arbara ceteraĵo estas dormanta kaj silenta; oni aŭdas apenaŭ malproksime kolomban murmureton; sola rondigita silia pinto zumas en lumo.

Laŭlonge de la branĉoj, floroj je pala verdaĵo milnombraj malfermiĝas, kaj en ĉiu floro kantas arbelo. Ĝi estas aera muziko, ĝoja, naskiĝinta sub plena suno, kaj iom post iom filtranta ĝis la malheliĝintaj malsuproj, kie ĉio estas paco kaj malvarmeto. Samtempe ĉiu folio distilas mielan roson kiu falas sur teron per nepalpebla pluvo; kaj alligataj de la sukera bongusto de tiu manao, ĉiuj niaj grandaj arbaraj papilioj, la marioj (mo-

rios) brunaj, borderitaj je flavaĵo, la vulkanoj (vulkains) diversnuancigitaj per fajra ruĝaĵo, la markoj (les mars) kun iridkolora robo, malrapide turniĝas en tiu duona mallumo, kiel belegaj flugilaj floroj.

Dum someraj noktoj precipe malkovriĝas silia magio, kun ĝia fortegeco kun bonodoro de maturigitaj herbejoj arabaro miksas sian tilian balzaman odoron. Ĝi estas odoro malpli eniĝanta ol tiu de tranĉitaj fojnoj, sed pli balzamumita kaj reviganta pri malproksimaj mirteatraĵoj. »

Ho! kiel dolĉe estas ripozi sub viaj ombraĵoj! Karegaj Bassigmaj arbaroj!

PAUL CHAMPION

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

Gazetaro Esperantista.

Algeria Stelo, 5 majo. — Diversaj sciigoj pri la esperantista movado. — Franclingva artikolo de NELLY LESTRANGE pri la arbaro de Teniet-el-Haad. — La redakcio sciigas, ke la gazeto nun aperos nur unufoje en ĉiu monato. — Amuzaĵoj.

Belga Sonorilo, majo. — AMATUS sprite rakontas aventuron de azeno Jefko. — J. COOX proponas starigi internacian helpkason en kiun oni kolektus monon de ĉiulandaj donacemuloj por helpi al viktimoj de katastrofoj. La esperantistaj gazetoj elektus unu riprezentanton el ĉiu lando por formi internacian helpkomitaton. — Diversaĵoj. — Novaĵoj el Esperantistujo. — J. COOX je la nomo de la *Belga Sonorilo* protestas kontraŭ Hilelismo: « Esperanto estas lingvo, nur lingvo; grava danĝero

minacos ĝin de l'momento, kiam oni (ĉu vole, ĉu nevole) kredigos ke ĝi protektas speciale ian ajn teorion politikan, religian aŭ filozofian ». — F. V. parolas pri nia mortinta samideano Haldor Midthus. AMATUS flandre babilas por nia lingvo. — Kroniko, bibliografio, amuzajoj, ktp.

Junio. — LUCIEN BLANJEAN proponas, ke la tria kongreso okazu en Antverpo. — Du priskriboj pri Svisujo kaj Moravujo. — Novaĵoj el Esperantistujo. — J. WESSEL tradukis versaĵon de van Beers: Lumo. — Belga Ligo Esperantista, kroniko, k. t. p.

The British Esperantist, junio. — Jara raporto pri la Brita Societo. Deficito da 250 fr. estas en la kaso, sed la propagando ekstreme prosperis. 53 grupoj societaniĝis (ĝis aprilo 1906); ili enhavas pli ol 1,200 membrojn. La senperaj membroj de la societo estas 274 kaj la « fratoj » estas 30. La unuagradan ekzamenon prospere subtenis 42 personoj; 36 ricevis la « ateston pri kapableco ». En la lasta jaro estis sendita cirkulero al la Nacia Societo de Instruistoj; multaj interesiĝis pri la lingvo. En Keighley la grupo esp. sukcesis konvinki la Instruan Oficejon provi la instruadon de Esp. dum unu jaro en la publikaj lernejoj. En Londono, la grupo decidigis la Komercan Cambron enkonduki Esp. en sian ekzamenan programon: 112 kandidatoj prezentigis. La konata gazeto *The Daily News* enpresas ĉiutage artikolon en Esperanto. Konataj komercaj firmoj, kiel « Stephen's Inks » dissendis cirkulerojn en Esperanto. La gravaj eldonistoj Cassell and Co., kaj Harmsworth eldonis lernolibrojn kaj enpresis kursojn en siaj revuoj. — Libraro kaj gazetaro. — H. GORDON prikribas vojaĝon en Islandon. — G. HANBURY esperantigis germanan popolkanton. — M. DAVID tradukis « la cirko de Gavarnie » laŭ V. Hugo. — D. H. verkis versaĵon « Malutileto ». — Cl. BICKNELL diras kelkajn vortojn pri la verkoj de nova poëtino itala, Ada Negri kaj tradukas du versaĵojn. — La ringofripono, originala rakonto. — Kroniko, diversajoj.

Der deutsche Esperantist, junio. — J. BOREL raportas pri la kongreso de germanaj esperantistoj en Braunschweig, kie fondiĝis la germana esperantista societo. — Harry BRUHL traktas la saman temon germane. — Kroniko. — D-ro ZAMENHOF respondas proponon faritan de S-ro Simon, ke oni elektu komunan festotagon por esperantistoj: « La ideo per si

mem ŝajnas al mi bona, sed mi ne povas aprobi la proponon, ke por tiu ĉi festotago oni elektu mian tagon de naskiĝo. Se la ideo per si mem estos akceptita de la esperantistoj, tiam estos necese elekti iun alian tagon, ekzemple la tagon de malfermo de la unua kongreso esperantista; aŭ la unuan tagon de la kalendara printempo (por la norda duonglobo) kiel simbolon de la printempo, kiun nia afero promesas al la homaro; aŭ la tagon en kiu en la jaro 1878 la unua rondeto esperantista proklamis la fintecon kaj la oficialan komencon de ekzistado de la lingvo Esperanto (17 de decembro); aŭ iun alian tagon laŭ elekto de la esperantistoj ». — R. AUERBACH tradukis « la blua mirindaĵo » de H. Ischokke. — Bibliografio. — Portretoj de generalo Sebert, col. Pollen, C. Bourlet, cap. Lemaire, cap. Capé.

L'Espérantiste, aprilo. — Teksto franca de la propono farita al la franca parlamento por enkonduko de Esperanto en la lernejojn. — Novaj aliĝoj al la Societo. — Kroniko. — Bibliografio — H. BOUCON tradukis amuzantan aventuron de fremdulo en Antverpo. — E. MARCELÉ originale verkis rakonton « Tapeto ». — L. DE BEAUFONT prezentas france kaj esperante frazeologion « En Bazaro ».

Majo. — L. DE BEAUFONT france batalas kontraŭ la trograndiĝoj de Esperantistoj, kiuj konkludas de amika renkontiĝo de 1200 samideanoj en Boulogne, por la tuta homaro esceptan vivkondiĉon fratan, amikan, k. t. p. Prezento de Esperanto, kiel rimedo por renovigi kaj reformi la mondon, estas la plej bonan maniero por malhelpi la disvastiĝon de nia lingvo, kiu estas kaj devas restadi nur lingvo. — Protokolo de komitata kunveno. — Novaj aliĝoj. — Kroniko. — Bibliografio. — KABE respondas kritikon faritan al unu lia verko, ke li ne uzas sufiĉe la kunmetitajn tempojn: « Kiam la teksto mem montras, kiu ago okazis antaŭe aŭ poste, aŭ kiam la afero estas indiferenta, la malsimplaj tempoj estas superflujaj; se oni skribas tiamaniere, la stilo estas senpeza kaj facile komprenebla malgraŭ la ekstrema malofta uzado de la kunmetitaj tempoj ». S-ro DE BEAUFONT respondas: « En multaj okazoj la afero ne estas indiferenta scii, ĉu iu ago sekvis aŭ antaŭiris alian: Pro tio kredeble D-ro Z. donis unu specialan ekzercon pri la kunmetitaj tempoj, kaj se mi ne timus altiri pri tiu ĉi punkto novan leteron al la gazeto, mi povus citi kelke da ekzemploj en kiuj, ĉe la stilo de nia

korespondanto, la evito de tempo kunmetita lasas en embaraso pri la ordo de du agoj. Mi ĉiam tre miris, ke la tuta pasiva konjugacio identa, krom unu *n*, kun la kunmetitaj tempoj de l'aktiva tute ne ĉagrenas kelkajn amikojn, dum doloras ilin ekstreme kunmetita tempo de l'aktiva. » Pri traduko de idiotismoj en *Ĝsp.*, la sama aŭtoro diras: « la fakto, ke *kelkaj lingvoj* uzas tiun aŭ alian esprimon ne faras, ke tiu esprimo perdas sian idiŝtisman, nelogikan karakteron... Esperanto ne fiksas la signifon de siaj vortoj laŭ la reguloj de tiuj lingvoj, sed laŭ la siaj ».

Espero Katolika, majo. — A. DOMBROVSKI parolas kontraŭ la saĝmallarĝeco de multaj homoj. La homa saĝo kaj koro estas ofte nature mallarĝaj, ofte kontraŭnature mallarĝigitaj. Tio estas la ĉefa kaŭzo de niaj malbonoj. La homaro serĉas veron kaj bonon, sed ne trovas ilin ĉar la saĝmallarĝeco elvokis senfinajn mallarĝajn, filozofiajn, politikajn, ktp. sistemojn. La grandeco de la homa saĝo ne estas identa kun ĝia larĝeco, ĉar tre granda saĝo povas esti mallarĝa (ekz. Darwin, Flammariŝn, Tolstoj). La veraj pensistoj kun rigardoj vere larĝaj ne esploras ian parteton de veraĵo, sed ĉion; ili volas klarigi ĉion, kompreni ĉion; tial ili forĵetas nenian fakton sen gravaj kaŭzoj kaj sen antaŭa esploro. Veraj pensistoj serĉas plenan sintezon de homa scienco, esprimeblan per formulo $X = R + F + S$ en kiu R signifas problemojn religiajn, F la filozofiajn, S la sciencajn. La pensistoj mallarĝsaĝaj faciligas al si la problemon per nuligo de unu, du, aŭ eĉ ĉiuj tri R. F. kaj S. Oni tiel ricevas: $X = O$ (nihilismo, skeptikismo), $X = R$ (mistikismo, panteismo), $X = F$ (idealismo, racionalismo), $X = S$ (empirismo, materialismo), $X = R + F$ (teozofio, tolstojismo), $X = R + S$ (okultismo, spiritismo), $X = F + S$ (pozitivismo, socialismo). La kreintoj de tiel kripligitaj sistemoj rememorigas pri la « alia mondo » de Shaffield, kie okazis disputoj inter estaĵoj « liniaj »; loĝantaj nur en unudimensia spaco, kaj estaĵoj « plataj » loĝantaj en dudimensia spaco. La unuaj povis moviĝi nur antaŭen kaj malantaŭen kaj ne povis kompreni, ke la « platuloj » povis moviĝi ankaŭ dekstren kaj maldekstren, kio ŝajnis al ili mizeraĵo kaj neeblaĵo. Simile tiuj platuloj ne povis kompreni kaj neadis la eblecon de tridimensia movadoj, posedata de kubo. Bedaŭrinde tiu ĉi « plateco » kaj « linieco » aperas ne nur en pensoj, sed en agoj: ĉiuj restas divid-

itaj, malamikaj, k. t. p., ĉar ili konsideras nur unu aŭ kelkajn dimensiojn de la aferoj, sed ne ĉiujn. Oni devas atenti ĉiujn aferojn de homa saĝmallargêco en literaturo, filozofio, teologio, scienco, politiko, sociala kaj internacia vivo, k. t. p., kaj ilin montri kiel hontindajn difektojn en la gazetaro. Estus bone en sama celo traduki la verketon « Au large! » de Joseph Serre. Oni devas fondi societeton por propagandi la ideon de kruciro kontraŭ la homa saĝmallargêco kaj specialan organon. La homoj bonvolaj ej largaj rigardoj unuigu por tio. — R. LAISNEZ tradukis *Dies iræ*. — Daŭrigo de « Lasta Abencerago ». — Revuo de revuoj esperantaj. — E. LIME diras, ke Hibelismo estas vera dogmaro, nova religio, kiun nenia katoliko povas akcepti sen forlaso de sia propra religio. Plie danĝere estas konfuzigi Esperantismon kun Hibelismo. — Sciigoj diversaj, bibliografio, ŝakoj.

(Daŭrigota.)

DIVERSAĴOJ

Pri la finiĝo -acio -icio.

Ni ekzamenu nur la substantivojn montritajn en la artikolito de H. B.:

1-e *Administracio* ne devenas de administr kaj ne respondas al administro. Ĝi estas internacia vorto esprimanta ideon internacian.

2-e *Civilizacio* kiel en 1-e.

3-e *Deklaracio* estas internacia vorto radika. Oni ne povas devenigi de ĝi alian infinitivon ol *deklaracii*. [Deklari ekzistas en nenia vortaro].

4-e *Deklinacio* devenas de la radiko deklinaci-i.

5-e *Delegacio* kiel en 1-e.

6-e *Konjugacio* estas radiko internacia; la infinitivo devenigebla el « konjugaci-i ». Pri tiu vorto, ni rimarkigos, ke iom pli da unueco estas necesa koncerne la kreadon de radikoj. Kial deklinaci-i-deklinacio kaj konjugacio-konjugaci-i?

7-e *Organizacio* ne ekzistas.

8-e *Spekulacio*, *ekspozicio-opozicio* estas radikoj internaciaj. Sekve: *spekulacii* k. t. p.

10-e *Kompozicio* estas en la vortaro de Beaufront, sed ne en la Wörterbuch Esperanto-Deutsch, en kiu troviĝas « kompono » kun la sama senco, kaj sekve kompon-i-isto k. c. Tamen mi pensas, ke « kompozicio » estas necesa vorto, neniel samsenca kiel kompono, kaj rilatanta al kompono, kiel administracio al administro, civilizacio al civilizo k. c.

HUGUES (*La Rochelle*)

Pri « centjaro ».

En la fino de la artikoleto « pri centjaro » H. K. B. skribas: « kiu povas malkonsenti? » Mi respondas: « Estas certe, ke oni povos konsenti kaj malkonsenti, laŭvole. »

1-e. Oni povos konsenti, se oni rilatos al la II-a regulo de plena gramatiko de Esperanto », laŭ kiu « la ĉefa vorto staras en la fino » de la vortoj kunmetitaj. Sekve cento da jaroj = jarcento (jahrhundert).

2-e. Oni povos malkonsenti, se oni rilatos al unu ekzemplo kiu troviĝas en « Fundamento de Esperanto ». Ekz. § 14, p-o 41-a). Ni legas:

Mil	jaroj	(aŭ	milo	da	jaroj)	faras	miljaron.	
Sekve	Cent	»	»	cento	»	»	»	centjaron.
Kvin	»	»	kvino	»	»	»	»	kvinjaron.

Cetere la majstro permesas ankaŭ « jarcenton » pro « centjaron. Car ni legas en la « Interrompita Kanto » (paĝo 56-a, linio 1-a): « kaj eniris en la grandan aleon, tra kies ambaŭ flankoj staris jarcentaj arboj ».

Tamen mi pensas, ke oni devus skribi:

Mi atingos baldaŭ mian centan jaron. — Li estas centjara. — Sana centjarulo. — Arboj centjaraj. — Kelkcentjaraj.

Nun estas la 20-a jarcento. — En nia jarcento. — Ciujarcenta festo k. c.

HUGUES (*La Rochelle*)

Al S-ro G. Kolowrat.

En Via malgrandampleksa, sed riĉenhava artikolo pri senarbitreco de nia gramatiko Vi uzis tre lerte kaj sprite « forstrekan »-analizan metodon; mi deziras al Vi montri, ke la sama rezultaton Vi ricevus se Vi irus en kontraŭan vojon, — se Vi demandos sin kiam — ne kion oni devas forstreki, kion oni ne povas uzi, por fine trovi, kio restas tiel uzebla, kio restas neforstrekita, sed — kion oni devas antaŭ ĉio uzi por atingi la plej grandan internaciecon, la plej ĝeneralan elparolecon kaj akcepteblecon. Tial mi iros laŭ sinteza metodo, komencante per elserĉo de plej internaciaj elementoj.

Kiaj estas la plej internaciaj finiĝoj?

Reala, praktika unuo de elparolado estas silabo, el kiu per analizo arta, sed ne scienca, oni eldividas vokalojn kaj konsonantojn. Ĉiujn silabojn ni povas grupigi en du kategoriojn, tiel nomatajn malfermitajn, finantajn kun vokalo, kaj fermitajn, finantajn kun konsonanto. Nun antaŭ ĉio oni devas konstati, ke silaboj malfermitaj, t. e. finantaj kun vokaloj, estas la vere internaciaj, estas tutmondaj: oni renkontas ilin en ĉiuj lingvoj, ĉe ĉiuj nacioj, ne ekzistas eĉ unu lingvo, kiu ne posedas malfermitajn silabojn, ne ekzistas eĉ unu nacio kiu ne povas elparoli ilin. Sekve ĉiuj ĉefaj finiĝoj devas esti malfermitaj, vokalaj. Kaj en Esperanto ni vidas ke ĉiuj vokaloj estas uzataj kiel finiĝoj: a, e, i, o, u. Sed kvin finiĝoj ne sufiĉus, ili postulas ĉu multsencecon de finiĝoj, ĉu multigon de formoj ĝis malklareco de vortrilatoj. Sekve oni ne povas uzi nur vokalojn, oni devas taksigi konsonantojn ankaŭ laŭ ilia taŭgeco por finoj de silaboj, t. e. de vortoj. Sekve, dua demando formuliĝas tiel: kia konsonanto estas la plej internacia kiel fino de silaboj? Tie ĉi antaŭ ĉio ni bezonas demandi pri lingvo ĥina, uzata de triono de homaro, ĉar ĝi la plej severe evitas silabojn malfermitajn kaj en fino de silaboj akceptas nur... « n » kaj « j », kiuj povas stari post ĉiuj kombinaĵoj de konsonantoj kun vokaloj, se vokalo mem ne estas la lasta sono de silabo; en unu silabo fina sono estas mezaĵo de « r », « l » kaj « ŭ »; en kelkaj silaboj ni renkontas en fino ion similan al duonvokalo, kiel nia « ŭ »; kaj en kunmetitaj vortoj ion skribatan laŭ angla metodo « tr' ». Ni rimarku tion kaj iru al lingvo angla, kiu posedas plej malgrandan

nombron da finiĝoj gramatikaj. Kiajn finiĝojn gramatikajn ĝi posedas? Nur kvin: Antaŭ ĉio « s », plue « d », elparolata precipe kiel « t », « ing », sen meta elparolo de « g », kiel naza « n », « er », kun « r » imaga, « est ». Tio estas ĉio. Ni venu al plej belsona grupoj da lingvoj — romana, kaj trarigardu la plej gravajn — francan, italan kaj hispanan. Francaj finiĝoj estas tro multaj por ilin citi ĉiujn, sed se ni elĵetos diferencojn skribajn kaj atentigos nur diferencojn aŭdeblajn, ni trovos ke la plej multaj finiĝoj estas vokalaj aŭ « n », « j », « s », « r », tro mola, « l » tro mola, « t », « m »; kelkaj maloftaj vortoj finiĝas kun « k » kaj « f ». En itala ĉiuj vortoj finiĝas kun vokaloj, en malmultaj okazoj, kiam ili finiĝas alie, ili finiĝas nur kun « n », « j », « l », « r ». (Du vortoj en tre maloftaj okazoj finiĝas kun « d »). En hispana, krom vokaloj, estas uzataj en finiĝoj s, r, n, l, j kaj « z », simila al angla « th ». En germana, la plej oftaj konsonantaj finiĝoj estas « n » kaj « s », « j » « ŭ », « r » (neklara), tiel same en sveda « n » kaj « s », en greka antikva « n », « s » kaj « j ». Mi ne povas detale fari plenan komparan analizon de ĉiuj lingvoj, sed mi jam vidas ke laŭ ilia internacia uzebleco por finiĝoj la konsonantoj sekvas tiel: n, j, s, l, d-t, ŭ, r. Ni devas ankaŭ rimarki, ke ĉiuj lingvoj uzantaj kaj konantaj diftongojn uzas kaj konas « j » kaj « i », sed ekzistas multaj ne posedantaj diftongojn, kiuj tiom ne malpli permesas uzon de « i » kaj « ŭ » post aliaj vokaloj, sed ne alie ol kun duona daŭreco, t. e. kiel « j » kaj « ŭ ».

N. P. EVSTIFEIEFF

(Daŭrigota.)



Presejo de la Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris

Administrantaro : **Th. Cart**, prezidanto ; **Paul Fruictier**, **Ch. Vêrax**, deleg. ;

Pro **Benoit**, D^{ro} **Vallienne**, membroj.

Sekretario de l'adm: **V. Chaussegros**. Teknika direktoro : **Lengyel Pál**.

Hjalmar Bäckström, *Saltsjöbaden*, proksime Stockholm, Svedujo, ricevas ĉiuspecajn komercajn komisionojn.

S-ro **PIERRE DÉRIBÉRE-DESGARDES**, medicina kaj scienca studento, 76, rue des Saints-Pères, Paris, interesiĝante pri medicino, botaniko kaj fitoterapio, deziras korespondadi pri tio.

★ INTERNACIA SIGNO

aprobita de grupoj kaj societoj en Kanad-, Anglo-, Belg-, Franc-, German-, Hispan-, Aŭstro-, Fin-, Itallando, Siberio k. a. rekomendata de S. F. p. E., butontrua, broĉa, kravata, ricevebla ĉe ĉiuj Grupoj Esperantistaj : 1 franko. — Rabato al la grupoj por almenaŭ 12 : 20 % . — Sin turni al S-ro

Emile P. GASSE, 105, Lycée, Le Havre, Franclando.

ADRESARO DE KOMERCISTOJ

akceptantaj uzadon de Esperanto.

AVIZO. — La unua enpreso estas senpaga ; ĉiu nova enpreso kostas 50 centimojn, dekdu presoj = 5 frankojn ; por niaj abonantoj : 12 presoj 2 frankojn.

Paris, 33, rue Lacépède, — *Presa Esperantista Societo*, entreprenas la faradon de ĉiuspecaj presaĵoj.

Glasgow, 137, Weet Regent Street, — *Tabaka Sindikato Esperantista*. — Specialaĵo : « CIGAREDO ESPERANTO ». — Telegrafa adreso : « Verdastelo, Glasgow ».

Barcelono (Hispanujo), Puerta-Ferrisa, 30. — *Johano Rosals*, librovendisto. Vendado de Esperantaj verkoj. Specialaĵo en libroj kaj utilaĵoj por lernejoj.

Valence d'Agen (France), — *Alfred Gérin*, posedanto de vinberejoj. Bonaj vinoj familiaj naturaj. Prezaro kaj specimenoj afrankite laŭ peto.

Hódság (Bács-megye), Hungarujo, — S-ro *Molnár Gyula*, deziras interŝanĝi kolektojn da papilioj kun loĝantoj de tropikaj landoj ; interŝanĝas ankaŭ elŝtopitajn (remburitajn) birdojn.

Paris, IV-e, 17, rue du Temple, — *Fernand Blangarin*, prezentanto por vinoj. Bonegaj vinoj el Bordeaux, Beaune, Madeira, Malaga, O Porto. — Rumoj. — Peti prezaron kaj specimenojn. — Forta rabato por Esperantistoj.


FLUGINTAJ REVOJ

Muzikverko, — duono soprano aŭ baritono, de PAUL WACHS. Teksto en Esperanto de A. GRABOWSKI.

Prezo 2 fr. — Ricevebla ĉe la

Preso Esperantista Societo

33, rue Lacépède, — PARIS.

DOKTORO SIFFRE  I. (Direktoro de l'Ecole pratique d'Odontologie), 97, Boulevard St. Michel, Paris, deziras korespondadi esperante kun nefrancaj dentkuracistoj pri malsanoj de dentoj kaj kuraciloj.

LA REVUO

**Internacia monata literatura gazeto
kun la konstanta kunlaborado**

de D-ro L. L. Zamenhof.

Tiu nova Revuo, tute redaktata en Esperanto, estos pure literatura; ĝi enhavos novelojn, romanojn, poeziojn, komediojn, dramojn, seriozajn studojn pri historio, geografio, statistiko, popolmoroj, k.c., kronikon tre mallongan pri la ĉefaj mondaj okazintaĵoj, bibliografion.

Ĉio politika, religia, aŭ kio povas naski disputojn, estos malakceptata de la Redakcio.

D-ro L. L. Zamenhof sola povos verki artikolojn pri la *lingvo*.

La 1-a numero aperos la 1-an de septembro 1906, okaze de la II-a Universala Kongreso de Esperanto.

Kosto : ĉiu numero 0 fr. 50
jara abono 6 fr.

ONI POVAS ĜAM DE NUN ABONI

ĉe la Librejo **HACHETTE** kaj **K-o**,
79, Boulevard Saint-Germain, **Paris.**

S-ro LOUIS PÉRIARD, Auxerre (Yonne) Francujo, deziras korespondi kun geesperantistoj, precipe fremdaj, per ilustritaj poŝtkartoj aŭ leteroj.

Preso Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris

